

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



*Sonrido*

61a jaro n° 3


julio - agosto - septembro

# Sonorilo

TRIMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice  
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81  
Maertens Grégoire  
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO  
Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken Tel. (03)276643

HONORA GENERALA PREZIDANTO  
Jaumotte Maurice

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO  
Dro Kempeneers Paul Sielens Henri

PREZIDANTOJ  
Debrouwere Gerard, Magdalenstraat 29 Kortrijk  
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

VICPREZIDANTO  
Roose Fernand

GENERALA SEKRETARIO  
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO  
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis  
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO  
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO Balleux René, Oude Donkiaan 83 Deurne

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2  
P.K. 9051 25

## La 54a Universala Kongreso de UEA en Helsinki (26-7 ĝis 2-8-69)

Detalojn pri tiu kongreso vi povos legi en revuoj kiel "Heroldo", "Esperanto" de UEA kaj "La Praktiko".

Ni donas tie-ĉi nur kelkajn substrekindajn faktojn kaj iom da komentario.

Partoprenis 1850 personoj el 39 landoj. Tio estas sukceso se oni konsideras la nordan situon de la urbo.

Sajne la organizo estis perfekta. Tio ne mirigas nin flanke de la Nordlandanoj. Sajne ankaŭ oni bone povis rimarki ke en tiu urbo estis Esperantomanifestacio pro la multaj flagoj kaj similaj kiuj frapas la atenton.

Dum la inaŭgura ceremonio parolis ministro Jussi Linnamo kaj vicurbestro A.K. Loimaranta, ambaŭ en Esperanto; Ni konas la en tiaj cirkonstancoj elparolitajn gratulojn kaj promesojn kaj varmajn simpatiojn... kiuj nenian estas sekvataj de agoj. Sed se tiaj personoj almenaŭ parolas en Esperanto, tio eble havas ian signifon. Efektive ni ne pensas ke persono, tute ignoranta la lingvon, povus paroli en tiu lingvo. Estis en tiu ceremonio ankaŭ multaj salutoj, i.a. de oficialaj reprezentantoj de registaroj. Tiu lasta fakto ne blindigu nin. Multe pli interese estus scii kiom da ĉiuj registaroj estas **efektive** favoraj al nia lingvo. Ekzemple nia registaro estis ankaŭ reprezentita; nome de la ministro de instruado. Sed lia ministerio estas kontraŭ esperanto; kaj li nenion entreprenas por esperanto. Ĉefa punkto de tiu ceremonio estas ĉiam la festparolado de Prof. Lapenna; ne nur ĉar ĝi estas oratora ekzemplo; sed ĉefe ĉar ĝi donas ideojn. Lapenna konstatas ke ekestas pli da naciaj ŝtatoj kaj ekfloron de novaj naciaj lingvoj. (Kiuj diris iam ke la nacionalismo estas for el la mondo?). Li konstatas ankaŭ sekve de tio, daŭran komplikiĝon de la lingva demando; ankaŭ en organizoj kiel UNO. Pri tio lasta li donis mallongan historian skizon (sed plene konvinkan). En tiuj organizoj kiel UNO, kiuj devus servi la aferon de la mondopaco kaj do de la ĉeaj justeco kaj bonfarto, la politiko sekvita de la grandaj nacioj estas kaŝa aŭ eĉ malkaŝa potencpolitiko... kiu kompreneble solvas nenium gravan problemon. Estas rimarkinde ke kelkaj eminentuloj el plej altaj instancoj komencas konsciigi pri tio. Lapenna citas ambasadoron Ralph Harry kaj la Britan delegiton en UNO Sir Leslie Glass kiu en debato diris jenajn rimarkindajn vortojn (propagandistoj eluzu tiun argumenton): "Eble iam, lasante flanke la tieron pri la naciaj lingvoj, ni ĉiuj lernos unu komunan duan lingvon. Se la popoloj povus interkomuniki per unu internacia lingvo, tiam estus preskaŭ nenio, kion la homaro ne povus atingi." Lapenna emfazas pli ke la internacia lingvo protektas la malgrandan kulturojn kontraŭ la lingva imperiismo kiu kelkfoje prenas la formon de kultura genocido. Kaj li pensas ke eĉ grandaj potencoj, kiam ili vidos ke ilia lingvo ne havas ŝancon esti alprenata kiel internacia lingvo, turniĝos ankaŭ al Esp. Kiel vi vidos ĝi estis interesa parolado kies tekston kompletan ni devas klopodi ekhavi kaj disvastigi.

Okazis ankaŭ la aliaj manifestacioj kiuj jam depost multaj jaroj plialtigas la kulturan nivelon de niaj kongresoj. La Internacia Somera Universitato; la teatraj prezentadoj (de bonegaj geaktoroj); la speciala Finna vespero k.a. La oratoran konkurson partoprenis nur tri, jes nur tri konkursantoj. Ankaŭ kiel kutime. Estis ankaŭ tre multaj kunvenoj de fakaj organizoj (juristoj ktp).

La radiostacioj de Helsinki kaj de Varsovio elsendis ĉiutage komunikadojn pri la kongreso. La unua ankaŭ mondvovojn en Esp. intence de la kongresanoj. Jen **faktaj** simpatiesprimoj, kaj faroj anstataŭ vortoj.

Ni povas do konkludi ke estis bela, inda kongreso.

(Raporto verkita laŭ notoj ricevitaj de la gazetara servo de la kongreso).

## La Vojo al la Venko : rompi la bojkoton !

Kial Esperanto ankoraŭ ne estas oficialigita kvankam ĝi estas jam relative vaste aplikata sur ĉiuj terenoj de la homa aktiveco kaj kvankam la bezono de komuna mondlingvo ĉiutage pli akre sentiĝas ?

Kial Esperanto ankoraŭ ne estas enkondukita en la lernejojn, kvankam diversaj eksperimentoj pruvis ke tiu instruo estas utila kaj ĝia ĝeneraligo dezirinda ?

Al tiuj demandoj kiujn ni ofte aŭdas de esperantistoj kaj de ne-esperantistoj estas nur unu respondo: pro la bojkoto de la grandaj ŝtatoj kiuj ankoraŭ, kvankam kaŝe, juras per la potencpolitiko kaj esperas altrudi sian lingvon kiel komunan mondlingvon ; kaj pro la sklava submetiĝo de la malgrandaj ŝtatoj kiuj prave aŭ malprave kredas ke ili bezonas la helpon de la grandaj potencoj por defendi sian politikan-ekonomian sistemon.

Ni volonte rekonas ke la registaroj de kelkaj malgrandaj ŝtatoj kelkfoje faris decidojn favorojn al Esperanto. Tamen ĝenerale ili faras nur tre heziteme kaj singarde kaj la rezultoj estas tiel limigitaj ke ili restas senefikaj kaj ke tre baldaŭ oni plu aŭdas aŭ parolas pri ili.

Se vi volas pruvojn, pensu nur i.a. al la entombigo en UNESKO de la fama rezolucio en Montevideo kaj al la hontinda fakto ke la plej alta internacia instanco, la sekretariato de UNO, en la jaro de la "Homaj Rajtoj" (!), atribuis al la petskribo de 73 milionoj da homoj favore al Esperanto ne pli da valoro ol al ĉifono.

Neniel povas mirigi ke la politikistoj tiel stulte neglektas la mondlingvan problemon. Ja ili jam pli ol sufiĉe pruvis sian nekapablon solvi la problemojn kiuj dividas, suferigas kaj eble detruos la homaron.

Ni ne timu diri tion : se Esperanto ankoraŭ ne estas oficialigita, la nura kaŭzo, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo de kiu ĉiuj aliaj kaŭzoj dependas, estas la lingvo-imperialismo de la grandaj potencoj.

Kaj tio respondas samtempe al la alia demando : kial la Esperantomovado stagnas ?

Antaŭ ĉio ni akcentu ke la lingvo Esperanto estas plue pli kaj pli amplekse uzata, tie parole kiel skribe, kaj ke ĝia literaturo konstante kreskas sur ĉiam pli alta nivelo ; kio signifas ke se estas stagnado ĝi rilatas ne al la lingvo Esperanto mem, sed nur al la Esperanto-movado kaj koncernas nur la nombron de ĝiaj membroj.

Estas fakto ke ĉiujare multaj novaj adeptoj aliĝas al la movado. Sed estas ankaŭ fakto ĉiujare same multaj membroj forlasis ĝin. Kaj tio estas tre komprenebla. Multaj homoj, konvinkitaj pri la neceso de komuna mondlingvo, naive kredas ke sufiĉas ke ili lernu esperanton por ke ili tuj povu profiti el ĝi. Kaj kiam ili konstatas sian eraron kaj trovas ke tiu stadio eble estos atingata nur en pli aŭ malpli fora estonteco depende de la bonvolo de ĝis nun kontraŭstaraj aŭ almenaŭ ne aktive favoraj instancoj, ili estas seniluziigitaj kaj forlasis la movadon pensante ke la decidojn de tiuj instancoj ili povas atendi same bone ekster la movado kiel en ĝi. Ili restas kompreneble adeptoj de esperanto kaj esperas ke la mondo kiel eble plej baldaŭ akceptos kaj ĝeneraligos ĝin. Ili agas malprave, sed ilia sinteno estas pardonebla ĉar komprenebla. Ili ja agas tute same kiel la movado mem. Ankaŭ ĝi atendas kaj esperas.

Oni ne miskomprenu min. Mi neniel kontestas la ampleksan kaj utilan laboron de la Esperanto-organizaĵoj. Se, kiel mi diris antaŭe, la lingvo estas ĉiam pli grandskale uzata kaj se ĝia literaturo daŭre kreskas kaj plibonigas, estas al ili ke ni ŝuldas tion. Sed ilia agado estis tro longe direktita preskaŭ ekskluzive al celo. Kaj tiu situacio ne multe ŝanĝiĝis. Ankoraŭ nun la propagando estas tro limige direktata internen, al la esperantistoj mem, kaj la ekstera mondo rimarkas nur malmulte de ĝi.

Antaŭ du jaroj kelkaj esperantistoj, konsciaj pri tiu situacio, fondis la Instituton por la Oficialigo de Esperanto (IOE), kiu efektive direktas sian aktivan propagandon eksteren al la grande publiko, sur la diversaj kampoj de internacia aktivado kiaj sporto, turismo, komerco, ktp. Tio povas pruviĝi paŝo antaŭen, kondiĉe ke ili konvinku ne nur la unuopulojn sed ankaŭ la kompetentajn organojn kaj akiras ties aktivan kunlaboron. Se unu sportisto partoprenanta en la Olimpiaj ludoj lernas esperanton, tio signifas ne pli ol se la oficiala movado varbas unu ngvan adepton. Sed se la organiza komitato de la Olimpiaj ludoj aktive kunlaboras akceptante esperanton kiel sian oficialan lingvon kaj rekomendante aŭ preskribante la uzon de esperanto al la sportistoj, tio estus venko. La tempo montrus al ni ĝis kiu grado IOE povos atingi tian rezulton.

Ankaŭ la oficiala esperanto-movado jam faris kelkajn malmultajn paŝojn eksteren : sed tio okazis tre, ja tro heziteme kaj timeme. De tempo al tempo oni kontaktis iun registaron aŭ iun lokan, nacian aŭ internacian instancon, sed tion oni faris ĉiam nur kun la ĉapelo en la mano kiel almozpetanto. Kaj se kelkfoje ia ŝajna aŭ eĉ ia vera rezulto estis atingita, oni ne povis solidigi ĝin ĉar por tio jam ne sufiĉas almozpetado. Por tio necesas pli energia, postulanta agado.

Eble la karaktero de niaj oficialaj organizaĵoj ne permesas tion ? Sed en tiu kazo ni devas krei organizaĵojn taŭgajn por tiu celo.

Estas nediskutebla fakto ke la definitiva venko de esperanto dependas de unu sola kondiĉo, nome la oficiala agnosko de la lingvo fare de registaroj, kio implicas ĝian enskribon en la programoj de la devigaj studobjektoj en ĉiuj lernejoj kaj ĝian uzadon fare de registaroj en iliaj internaciaj rilatoj.

Tiu oficiala agnosko estis la celo kiun la esperanto-movado proklamis ekde sia estiĝo kaj ĝi estas, devas esti, ankoraŭ nun nia nura celo. Ĉiuj aliaj atingaj povas esti valoraj, sed ili markas tamen nur etapojn al tiu celo.

Kiel supre dirite, estas jam superflue pruvi ke tiun oficialan rekonon ni neniel akiras de la registaroj per la almozpetanta metodo kiun ni aplikis ĝis nun. Ĉiuj registaroj, kiel ankaŭ ĉiuj decidopovaj instancoj, ĉu lokaj, ĉu naciaj aŭ internaciaj, atribuas valoron al iu afero kaj agnoskas ĝin nur se ĝi estas postulata de granda amaso. Kaj tio montras al ni la vojon.

Kion ni bezonas estas amasmovado, ne de almozpetantoj, sed de postulantoj, de batalantoj. Ni varbu la milionojn da simpatiantoj, ne ĉefe por ke ili tuj lernu la lingvon, sed en la unua loko por kunbatali por ĝia oficialigo. Jam por Zamenhof esperantisto devis esti batalanto, paca ja, sed tamen batalanto. La homoj ĝenerale multe pli facile ekhavas kaj konservas interesigon por io kion ili devas konkuri ol por io pri kio ili povas nur esperi ke ĝi iam (sed kiam ?) falos kiel donaco el la ĉielo.

La elito de tiu movado estu la praktikantoj de la lingvo kiuj uzos, sed fanatike uzos esperanton en ĉiuj siaj rilatoj kun alilingvanoj. Ankaŭ la milionojn kiuj iam lernis esperanton sed forlasis la movadon, ni tiel retiros el la sterila atendismo, revokante ilian entuziasmon per la perspektivo de la venko. Cetere pro la batalspirito kiun tia movado stimulas ĉe ili oni povas esti certa ke ĉiuj membroj ĝenerale lernos kaj uzos la lingvon.

La oficiala esperanto-movado prefere estu kulturmovado kontrolanta, protektanta kaj defendanta la lingvon. Sed apud kaj sendepende de ĝi ekzistu agitanta, batalanta organizaĵo, speco de ligo de Esperanto-aktivistoj, kiu per siaj nombro kaj dinamismo, kaj per ĉiuj leĝaj rimedoj kaj presajoj, mitingoj, manifestacioj ktp konstante faru premon sur la socialaj kaj kulturaj organizaĵoj por ke ili rekonu kaj apogu la fakton Esperanto vivanta mondlingvo ; sur la gazetaroj por ke ĝi dediĉu al Esperanto almenaŭ tiom da atento kiom al la kart-kaj kolomboludoj ; kaj sur la politikaj partioj kaj registaroj por devigi ilin proponi, defendi kaj aprobe baloti la leĝojn necesajn por la oficialigo de Esperanto.

Esperanto estas paca afero kaj ni certe ne celas perfortan ribelon. Sed kviete, ĝentile proponante kaj demante ni akiris nenion. Tial ni devas organizi amasmovadon de konvinkitaj, decidemaj kaj venkocertaj batalantoj kiuj, trankvile se eble, brue kaj tumulte se necese, altrudos la oficialigon kaj ĝeneraligon de Esperanto kiel komuna mondlingvo.

Hector Boffejon

# INTERESAJ REVUOJ

"La Monda Lingvo-Problemo". Eldonas Mouton, en Den Haag, Nederlando.

Venis la dua kajero de tiu revuo kiu efektive plenumas siajn promesojn. Ni insistas por ke oni montru ĝin al sciencaj institutoj, bibliotekoj, grupoj. Pro la fakto ke ĝi estas scienca, tie estas ĝia loko. Krom la internaciaj lingvaj problemoj, ĝi pritraktas la lingvoj en Taiwan, la problemojn en la Nederlandaj Antilo kaj... en nia lando. Estas anoncita plia artikolo pri tio en la 3a kajero.

"Biblia Revuo" Piazza Duomo 4 ; 48100 Ravenna, Italujo.

Ni ricevis la numeron marto-aprilo de 1969. Ni tuj diru ke je nia granda ĝojo ni trovis artikolojn kiuj povas interesi ankaŭ nespecialistojn, kiel ekz. la "Katalogo de antikva mitologio", "La Biblio kaj la Okcidenta historiista tradicio", "Cezarea, historio, monumentoj kaj trovoj" kaj mallongan noton pri "Heraklo kaj Jesuo". Ni ne mencias la regulajn kronikojn. Tiu revuo aperas regule kaj meritas vastan sukceson.

"Norda Prismo" Nro. 2 de 1969.

Ni jam ofte atentigis pri tiu altstara kultura revuo. Ĝi estas ankaŭ ilustrita (ofte tre bele kaj abunde). La enhavo estas plej varia. Prozo kaj poezio tre altnivelaj. Ni devas ĉifoje substreki ĝian objektecon. Ĝi ja publikigas noton de W.A. Verloren van Themaat kiu estis sendinta originalon kaj tradukon de kvar sonetoj el la "Sekretaj Sonetoj" al la redaktoro de Nederlanda literatura revuo, por ekkoni lian juĝon. Tiu juĝo estas malfavora. Nia komentario : 1) unue, ni dubas ĉu nomita redaktoro, malgraŭ lia aserto, povis kompreni sufiĉe la esperantan tekston : due, ke "abundas dolĉaĉa sentimentaleco" estas malĝusta juĝo de la redaktoro, kiom kompetenta li estu (sed kiu juĝas pri lia kompetenteco ?) ; trie, nia samideano povis fari pli bonan elekton de poemoj por sendi al tiu redaktoro. Ni, kontraŭe, daŭre asertas ke la Esp.-poezio troviĝas sur tre alta nivelo, komparebla kun la plej bonaj naciaj poezioj. Tio, malgraŭ la fakto ke aperas ankaŭ multaj "rimaĵoj". Ni, fine, notu ankaŭ ke jam kelkfoje aperis en "Norda Prismo" kontribuoj de nia Oostenda samideano Christiaan Declerck.

"Heroldo de Esperanto"

sciigas ke la abonprezo restas neŝanĝita por 1970. Tio estas sendube bona novaĵo, ĉar, kvankam tiu kotizo ne devus esti malhelpo por aboni la solan (kaj interesan) du-semajnan gazeton, restas tamen la fakto ke aperas multe en la Esp.-mondo kaj ke sekve la budĝeto de bona esperantisto estas alta sumo. Plie, kiu pagas nun la abonkotizon por 1970, ricevos senpage ĝis fino 1969 ĉiujn numerojn. Estas preskaŭ abono de jaro kaj duono por la prezo de unu jaro. (aŭg. '69). Por aboni : "Sonorilo", Kerklaan 61, Brugge ; kotizo : 210 belg. Fr. (p.ĉ. Nro : 152140)


"Turista Mondo" N-ro 1. Eldonejo, redakcio kaj adm. : Zürich 22, Svislando. Abonprezo : 10 Sv. Fr.

Jam de post kelkaj monatoj estis anoncite ke Dr. Hj. Unger el Svislando kuraĝus eldoni novan turistan gazeton en Esperanto. Jen kuŝas

antaŭ ni la unua numero, kiu estas promesplena. Enkondukas ĝin per kelkaj vortoj Franc-, Angla- kaj Hispanlingvaj Arthur Haulot, la ĝenerala komisaro por turismo en Belgujo. Ĝajne en la U.I.O.O.T. (la internacia organizo por turismo) ne ekzistas la kaŝa batalo de lingvaj imperialistoj, kiel ni konstatas tion en UNO, UNESCO kaj similaj organizoj. Jen bona signo por Esp. Tie oni komprenas la gravan rolon kiun Esp. povas ludi por la homaro. Sur 8 grandformataj paĝoj oni trovas artikolojn pri Monako, Kanado, Lucerno kaj Prago. Ilustrajoj, abundas. Plie estas rekiomaj kaj multaj turistaj sciigoj. Ĉiu kiu interesiĝas pri turismo kaj regule faras vojaĝon, devas aboni tiun-ĉi revuon. Ĝi aperos kvarfoje jare.

**Fina noto.**

Ni menciis tie-ĉi nur kelkajn de la interesaj revuoj kiuj aperas. Alian fojon ni prezentos "Oomoto", "Suda Stelo", "Sennacieca Revuo" k.a. La esperantistoj havas do riĉan elektolecon. Multaj diros : estas de la bono, tro. Efektive, oni ne povas aboni ĉiujn. Ĉiu faru laŭ sia gusto, ŝato, kompetenteco ; sed ĉiu bona esperantisto abonu unu, du. Ĉiuj grupoj devus aboni kelkajn... i.a. por legi kaj preparoli en grupkunvenoj. Estu certaj pri tio-ĉi ke tiuj revuoj vere donas kulturajn riĉaĵojn.



## DECIDO DE LA ADMINISTRANTARO

La administrantara kunsido de B.E.F., okazinta la 3an de majo en Bruĝo, (dum la kongreso) konsiderante ke S-ro. Maur. JAUMOTTE skribe petis por esti malsaniga - pro malsano - de sia tasko de ĝenerala prezidanto de B.E.F., decidis lin nomi "Honora ĝenerala prezidanto" kaj provizore ne anstataŭi lin, S-ro J. Verstraete plilarĝigos sian taskon de ĝenerala sekretario ricevante ĉiujn komunikadojn por B.E.F. kaj laŭnecese trasendante ilin al la du prezidantoj : S-ro De Brouwere kaj D-ro Denoël.

Por tion efektiviĝi, la oficiala sidejo de B.E.F. estos translokata al la adreso de S-ro. Verstraete.



## KRONIKO

### Esperantistaj Okazintoj kaj Okazintoj.

1) Kulturaj kaj Internaciaj Ferioj en Grésillion (20 julio ĝis 3 aug.)

Malgraŭ la multaj anoncoj en revuoj ĝi estis ne sukceso rilate al la nombro de partoprenantoj. La ĉefa kaŭzo estas la nekonateco. Efektive se oni unu fojon ĉeestis, oni arde deziras reiri tien. Estas ja tiom da allogaĵoj. Unue, oni vere ripozas tie. Due, estas tre bela ĉirkaŭaĵo por promeni kaj ankaŭ la Loire-valo ne estas malproksima. Trie, oni ĉiam zorgas pri alloga programo kun interesaj prelegoj (tamen oni ne estas devigata ĉeesti) kaj kun agrablaj vesperoj. Kvare, la tuta partoprenantaro de multaj nacioj formas post jam nur kelkaj horoj grandan familian rondon. Mi ne volas mencii aliajn detalojn kiel ekz. la bonan kaj abundan manĝaĵon, la malmultan koston de la restado. Kion oni deziras pli? Ĉu multaj eble pensas ke ĉi tiuj linioj estas nur propagando? Ke tiuj kiuj hezitas informiĝu ĉe partoprenintoj. Ĉi tiun jaron denove S-ino Cheverry konatigis la regionon de la Loire; estis denove ekspozicio de Esp.-libroj (pri kiuj paroladis S-anoj J. Thierry kaj Roose); estis filmvesperoj kaj paroladetoj; estis nunjare la paroladserio de Novzelandano Major; estis ree diversaj ekskursoj ktp. ktp.

Kun ĝojo tamen ni povas sciigi ke la kastelo estis tute kaj tute plena por la sekvinta restado, la Kulturaj, esperantistaj semajnoj de la 3a ĝis la 24a aug. Kaj la partoprenantoj estis grandparte gejunuloj.

2) 13a Internacia Seminario de G.E.J. en Marburg de 27-12-'69 ĝis 3-1.

La dekdu antaŭaj seminarioj kiujn organizis jam la Germana Esperantista Junularo iĝis famaj pro siaj scienca karaktero kaj bona organizo. Ĉiufoje la organizintoj sukcesis elekti interesajn temojn kaj venigi kompetentajn konferencantojn. Nunjare la temo estos: "Tendencoj en la Literaturo de nia epoko". Denove kompetentaj personoj pritraktos tutmondan kaj ankaŭ esperantistan literaturojn. La partoprenintoj jam scias ke ankaŭ la distra parto estas ĉiam zorge preparita.

Oni restados en la Marburga junulgastejo. Kompletata partoprenkosto estos 90 Germ. Mark. (ĝis 30a de Nov.; poste 100) por tiuj kiuj superas la 25 jaraĝon. Aliaj pagos 75, aŭ 85 GM. Adreso: Uwe Joachim Morits: Merken 5161; Andreasstrasse 57; telef. (02421)81916.

### Mallonga noto pri poezio

En mallonga artikolo, aperinta en "Heroldo" de 16a jan. '69, skribis W. Auld: "Poezion oni ne kreas el nuraj teorioj - se jes. Brendon Clark, ekzemple, estus poeto". Tiun juĝon pri la Nov-Zelandano, la Aŭstraliano F.R.B. (anham) ne ŝatas, kaj li reagis en "The Australian Esperantist" de majo 1969. Ni devas diri ke ankaŭ ni ne ŝatis tiun rimarkon. Se W. Auld riproĉas al Br. Clark ke li teorias, li devus fari saman riproĉon al Edwin de Kock. Se aliflanke li opinias ke Br. Clark ne estas poeto, kiun epiteton oni tiam devas doni al ekz. V. Sadler ("Memkritiko"), kaj al Porstein Frau Hamri (en traduko de B. Ragnarsson). Ĉar se iam oni mistifikis poeziamantojn, tiam certe per la eldono de tiuj du stultajoj. Sed mi pensas ke la vera kaŭzo de la malŝato de kelkaj je Br. Clark estas ke li kapablis verki verajn, belajn poemojn sen tro da neologismoj kaj sen elizioj. Aliaj kiuj ne kapablas fari tion, kompreneble envidias... kaj malŝatas... kaj kritikacas. Oni indulgu ilin. Sed la indulgo ne devas esti tiel granda ke oni eldonu kaj legu iliajn tiel nomatajn verkojn. Por fini ni devas tamen ankaŭ diri ke ni konsideras W.A. kiel grandan poeton. Despli mirigis nin tiu lia eldiro.

F.R.

### Komuniko kiu estas peto.

Ni povas helpi samideanojn kiuj volas reaktivigi la esperantomovadon en Sud-Vietnamio kaj kiuj devas labori en tre malfacilaj cirkonstancojn, sendante al ili ĉiajn materialojn, dokumentojn, esperantajjn. Adreso: Nguyen-Phuoc-Trach; 386/43 str. Truong-Minh-Giang SAIGON Sud-Vietnamio.

### K E H L : Internacia junulara renkontiĝo

4-12.4.69

Organizis GEJ - JEFO

Denove okazis en Germanio la jam tradicia junulara paska renkontiĝo: tradicia, ĉar jam dum pli ol dek jaroj GEP organizas tiajn renkontiĝojn. Ĉi-foje ĉeestis 50 gejunuloj el 10 landoj. Krom feria tempo, la ĉefa temo estis: Kion deziras la nuna junularo. En tiu kadro prelegis S-roj Behrmann, Giloteaux, Bakker kaj Sakmann. Ankaŭ la European domon de Strasburgo ni vizitis. Estis krome diversaj laborkunsidoj - dume la gepartoprenintoj povis sunbani - en kiuj inter alie oni preparolas la organizadon de la sekvantjara paska renkontiĝo en la kadro de la kongresoj de GEA, LEEN kaj BEF.

**Konkludo:** se vi volas interese, agrable kaj malmultekoste ferii en Esperanta medio, via venontjara feria celo estu

AACHEN

laŭ raporto de A. Geelen

### TRIA INTERNACIA KURSO POR GVIDANTOJ

organizita de TEJO sub la aŭspicioj de la instituto Lodewijk de Raet en Vilvoorde

24 - 30.8.69

Al tiu kurso por junulargvidantoj partoprenis 8 estraranoj de la junulargrupo de Sint-Kruis: ĉiuj estis do pretaj dediĉi parton de la ferio por pritrakti la organizadon de grupo, de kongreso, de internaciaj kontaktoj, k.p.t. Ni gratulas Linda Goethals, Hilda, Gerda kaj Walter Lauwers, Dirk kaj Johan Maertens, Jan Rachels kaj Kris Van Loo por tiu iniciato kaj ni esperas ke ili nun estos pretaj kun nova energio, por gvidi nian Esperanto-grupon en Sint-Kruis.

## TRILANDA ESPERANTO-KONGRESO

27. - 31.3.1970 Aachen / FRG

Loka Kongresa Komitato : 51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172

Belga Esperanto-Federacio, Nederlanda Esperanto-Asocio L.E.E.N. kaj Germana Esperanto-Asocio interkonsentis aranĝi komunan kongreson por akcenti internacian kunlaboron. Jen kelkaj bazaj informoj :

**Datoj :** 27-a ĝis 31-a de marto 1970 ;

**Kongresejo :** "Staatliche Ingenieurschule für Bauwesen" (ŝtata konstru-inĝeniera akademio), modernega konstruaĵo en agrabla kvartalo de Aachen ;

**Temo :** "Lingvaj problemoj en Eŭropo" ;

**Programo :** tri laborekscioj pri diversaj aspektoj de la kongresa temo, vizito al la urbaj vidindaĵoj, administraj kunsidoj, balo, fak-kunvenoj, tut-taga ekskurso tra pitoreskaj lokoj limregionaj de Nederlando, Belgio kaj Germanio ;

**Kotizoj :** kongresana - GM 12,—, edz(in)o - GM 6,—, junulo (inter 15- kaj 25-jara) - GM 5,— (post 1.1.70 la kotizoj ĉiukategorie plialtiĝos je GM 3,—), infanoj malpli ol 15-jaraj ne pagos kotizon ; prezo de la tut-taga ekskurso (sen manĝaĵoj) provizore : GM 12,—.

### INTERNACIAN JUNULARAN RENKONTIĜON

de la 27-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1970 en la ĉarme situanta junulargastejo de Aachen.

Kvankam tiujn ĉi kongreson kaj junularan renkontiĝon organizas tri Landaj Asocioj de UEA resp. Landaj Sekcioj de TEJO, tamen esperantistoj el ĉiuj landoj kaj el ĉiaj unuiĝoj estos tre bonvenaj !

- Pro aliĝiloj, hotel-mendiloj ktp. oni turnu sin al : TRILANDA ESPERANTO-KONGRESO, 51 AACHEN, KARL-MARX-ALLEE 172

### HONORA KOLONO POR AACHEN

S-ro Debrouwere, Gerard	150	Kortrijk
S-ro Debrouwere,	75	Kortrijk
S-ro Boffejon, Hector	150	Brasschaat
S-ino Boffejon, Annie	75	Brasschaat
S-ino Meurrens, Anna	150	Leuven
F-ino Opsomer, Simone	150	Bruselo
S-ino De Hondt, Jeanne	150	Antwerpen
S-ino Vermuyten, Blanche	150	Antwerpen
F-ino Orsolini, Andrée	150	Charleroi
S-ro Poupeye, Charles	150	Brugge
S-ino Poupeye,	75	Brugge
F-ino Poupeye, Yvonne	75	Brugge
S-ro Maertens, Gregoire	150	Sint-Kruis
F-ino Willems, Madeleine	150	Brugge
F-ino Geers, Blanche	150	Antwerpen
F-ino Saelemaekers, M.G.	150	nova
F-ino Henquinez, Marie-Thérèse	150	Leuven
F-ino Peeters, Clara	150	Antwerpen
S-ino Dewerchin, Simone	150	av. de la Basilique 382 Bruxelles 14
S-ro Fighiera, Gian Carlo	150	Bruselo
S-ino Fighiera, Ada	75	Bruselo
S-ro Verstraeten, Jules	150	Hoboken

2925

## Bibliografio

## Recenzoj



**Manuel Halvelik, "Kūasaroj... ĉu estigantaj subsistemoj?"**

Grandformata broŝuro 85-paĝa, eldonita de la aŭtoro, aŭgusto 1968. Fotokopiita tajpajo ilustrita.

Tiu ĉi verkajo estas vastigo de flanktemo el pli frua studo 'Pri Gravito kaj Tempo' (1967, elĉerpita).

Per bona lingvaĵo en kiu eraroj estas maloftaj la aŭtoro traktas temon ĉe kiu sin renkontas astronomio kaj fiziko. La aŭtoro komparas la kūasaron kun stelataro, aparato per kiu hodiaŭaj fizikistoj provas efektiviĝi fuzion de hidrogenatomoj. Ĉirkaŭ centra stelo turniĝus ringego da tre jonigita gaso en forta magnetkampo. Per tiu 'plasmotrono' estus ekspikeblaj ĉiuj enigmoj de la kūasaro.

La kūasaroj ne troviĝus ĉe la rando de la universo — kiel ĝenerale supozate — sed en nia propra galaksio ! En sia hipotezo la aŭtoro jesas la demandon faritan en la titolo. Per multaj desegnaĵoj kaj kelkaj fotografajoj li ilustras sian teorion. Ĉe la fino li resumas duan parton ankoraŭ eldonotan en kiu la samaj principoj estas aplikataj al estiĝo kaj formiĝo de galaksioj.

Lu Rusa astronomo intertempe faris similan proponon, per kiu li montras, ke la enigmaj fenomenoj de kūasaro, novstelo kaj pulsaro ne estus katastrofaj eventoj, sed tute normalaj evoluoj de galaksia materio.

La aŭtoro ne estas sciencisto, sed multe-leginta amaturo pri sciencaj temoj. En sia 'Gravito kaj Tempo' ekzemple, li pristudis la fenomenon de la 'flugantaj teleroj' kaj esploris la eblon vojaĝi en la tempo.

Liaj verkoj tamen ne estas scienca fikcio, sed volas esti sciencaj traktatoj.

La amatoreco de la aŭtoro ne estu malhelpo havigi al si tiun skribajojn. Sciencaj kaj teknikaj tekstoj en Esperanto ne estas oftaj kaj jam pro tio la broŝuro estas valora. Ĝi ne nur alportas aron da sciencaj terminoj, sed estas samtempe ĝuinda kuriozaĵo por ĉiuj legantoj kun vasta intereso.

Kuriozaĵo ĝi estas en tiu senco, ke ĝi konigas sambate aliajn ideojn kaj celojn de la aŭtoro, nome :

- 1) La aŭtoro faras distingon inter
  - normlingva Esperanto (por sciencaj kaj aliaj fakaj verkoj) kaj
  - socilingva Esperanto (por ĉiutaga uzo).Liaj verkoj estas skribitaj en normlingva Esperanto (kaj provizitaj per glosaro !). Tio neniel ĝenas la legadon. Sed la intenco ellabori normlingvon povas aspekti al 'Fundament'uloj kiel subfosa laboro, ĉar ĝi alportas multajn ŝanĝetojn, precipe en internaciajn vortojn de grek-latina deveno. Kvankam la aŭtoro pravas en principo, la ŝanĝoj (konsekvanciaj !) ne ŝajnas ĉie nepre necesaj.
- 2) En la nomlisto ni vidas specimenojn de fonetika transskribo laŭ la Universala Skribo de la aŭtoro.
- 3) La aŭtoro volas iniciati 'arkaikan Esperanton' : iomete kaj laŭregule ŝanĝita Esperanto, kiu servus por mezepokaj tekstoj, malnovaj sentencoj kaj aliaj okazoj bezonantaj antikvan lingvoformon. Kelkaj specimenoj troviĝas en la cenzurita broŝuro.

La amatoreco de la aŭtoro garantias, se eble ne tute scienca ĝustecon (mi ne kompetentas juĝi pri tio), almenaŭ profundan interesiĝon pri la problemoj.

Dum sciencisto ofte havas tro striktan rigardon pro okupiĝo pri sia nura specialaĵo, amaturo havas pli larĝan vidon, ĉar li moviĝas sur diversfakaj terenoj. Tio ebligas al li labori sinteze kaj rimarki rilatojn, kiujn aliaj pretervidis.

C.R.A. Declerck

## PETOLI KUN SHAKESPEARE....

### SED NE TRO FRUE !

William Shakespeare, "Somermoznoka Sonĝo", tradukita de K. Kalocsay.  
100 p. Eldonis Stafeto, "Beletraj Kajeroj", 1967. Prezo : 1,50 US. Dol.

Tre ĝojiga fakto en la lastaj jaroj estas tiu, ke niaj plej talentaj verkistoj pli fervore ol antaŭe interesiĝas pri Shakespeare. Dum sia evoluo la internacia lingvo ja eniris stadion, en kiu ĝi kvazaŭ invitas ilin rekrei en ĝi la plej malfacilajn ĉefverkojn de la naciaj literaturoj. Respondante al la invito kaj ekzercante ĉiujn siajn fortojn super la Shakespeare-aj dramoj, niaj verkistoj efektive riĉigis la internacian lingvon per tradukoj, kiuj altgrade kontentigas la severajn postulojn de la beletra tradukarto. Tiel aperis :

- en 1960, "Otelo", tradukita de Rétó Rossetti ;
- en 1964, "Hamleto", tradukita de L.N.M. Newell ;
- en 1966, "Reĝo Lear", tradukita de K. Kalocsay.

"Somermoznoka Sonĝo", kiun mi ĉi tie volas preparoli, estis jam presita en 1967. Tradukis ĝin ankaŭ Kalocsay laŭ la samaj principoj, aplikitaj en lia "Lear"-traduko kaj mi tuj diru, same sukcese. La serio "Beletraj Kajeroj", en kiu ĝi aperis sub n-ro 31 (la libro erare mencias 30), akiris per ĝi altvaloran eron. Reciproke, la poŝformato de la serio, la bonkvalita papero kaj la klara (kvankam iom malgranda) preso plene taŭgas por tia verko. Same bona ŝajnas al mi la prezentado : 1-e, la teksto ; 2-e, postparolo pri la originalo kaj la traduko ; 3-e vasta komentario pri malfacilaj lokoj en la originalo ; 4-e, glosaro enhavanta kvardekda neologismoj, ne troveblaj en P.V. kaj ĝia Suplemento.

Laŭenhave "Somermoznoka Sonĝo" estas komedio-feaĵo, kiu tamen havas fortajn radikojn en la vivrealo (oni komparu ĝin al la fabeloj de Andersen). Kalocsay trafte nomas ĝin "ĉefverko de ĉarmo". Tradukante ĝin li devis ne nur solvi la kutimajn problemojn de versa tradukado, sed samtempe montri ke "li estas hejme" sur ĉiuj stilniveloj : stiloj nobla (de la nobeloj), burleska (de la metiistoj), fantazie-petola (de la feoj).

Kompreneble, tian verkon oni ne legas same facile kaj same rapide kiel ordinaran romanon. En la "Postparolo" Kalocsay diras ĉi-rilate : "Post la apero de mia "Lear" certa simplisto skribis, ke prefere lerni angle kaj legi "Lear" en la originalo : tio estas pli facila. Mi opinias tamen, ke pli facile estas rigardi la nekonatajn vortojn en la Glosaro, ol lerni ne nur la anglan sed ankaŭ la ŝekspiran lingvon."

Kalocsay plene pravas. Tamen, por vere ĝui la kvalitojn de lia tradukarto en "Somermoznoka Sonĝo" ne sufiĉas memori kvardekda neologismoj. Por vere ĝui ilin, estas antaŭ ĉio necese, ke la leganto jam altgrade sciu la internacian lingvon, precipe ke li regu la teknikojn de la vortfarado kaj de la frazkonstruo, kaj ke li konu almenaŭ la principojn de la verskreado. Oni ofte petoladas en "Somermoznoka Sonĝo", sed kun Shakespeare petolos nur tiu, kiu jam akiris plenan literaturan kaj lingvan "maturecon" !

El la sukceso de la libro montriĝas, ke tiun maturecon posedas jam multaj esperantistoj. Mi kore esperas, ke ne pravos la skeptikuloj, kiuj asertas, ke la nombro de tiaj esperantistoj estas malpli granda ol ni emas kredi.

A. Samyn

### Novajo pri "The International Language Review".

Tiu stencilita kvaronjara revuo okupigis pri ĉiuj novaj projektoj de mondlingvoj kaj aperigis artikolojn pri ĉiuj problemoj en rilato kun la mondlingvaj ideoj kaj movado. Tial ĝi estas nepre havinda de ĉiuj kiuj havas iom gvidan postenon en nia movado. Tiu revuo plu aperos dum 1969, sed pli ampleksa, kaj presita. La titolo estos nun "International Language Reporter". Provonumeron demandu al adreso : P.O. 393, Denver 1, Colorado, United States of America.

## ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"  
Kunsidoj : Ĉiuvendrede en Brasserie  
"Capitole", Gemeentestraat 15  
Antwerpen je la 20,15a horo.  
Poŝtadnumero : 726.54.

La 25an de Aprilo estis unu el la "Parolataj jurnaloj" kun ĉies kontribuo. Kunlaboris hodiaŭ Jo Haazen kiu majstre kaj elokvente laŭlegis tekston de Jean Forge el "La Verda Raketo" pri "Martiroy de nia afero". S-ino Lecat parolis pri la radiumo kaj la vivo de Marie Curie kaj poste F-ino Hélène Hofkens klarigis kiamaniere Dio kreis la virinon, je la beno kaj malbeno de la viro kiu "ne kapablas vivi kun ŝi, nek sen ŝi."

La postan vendredon estis la sama temo, sed prezentata de aliaj personoj. Denove el "La Verda Raketo" F-ino Agnes Geelen legis tekston "7 leteroj" kiu amuzis la tutan ĉeestantaron. Sub la titolo "cent kaj unu blasfemioj" Paul Peeraerts instruis kion ni diru en certaj malagrablaj cirkonstancoj. Dum la kultura parto S-ro Verstraeten rakontis menciindan anekdoton el la vivo de Rubens kaj Velasquez kaj Paul Peeraerts parolis pri unu el la plej konataj esperantistoj : Jules Verne. Fine s-ro Ivo Durwael eksplikis kio fakte estas la IAV, la Imposto sur la Aldonita Valoro.

La 9an, la vendredon post la Marko-la kaj Belga Kongreso, tiu ĉi kunveno en Brugge estis kompreneble la ĉefpunkto. S-ino De Hondt, f-inoj Lydia de Muynck kaj Bietje Peeters kaj s-roj Verstraeten, Haazen kaj Peeraerts raportis por la neĉeestintoj detale pri ĉiuj okazintajoj.

Unu semajnon poste du lernintoj de la BEJA-kurso en Durne ricevis siajn diplomojn el la mano de nia prezidanto. Ili estis William Arekens (kun granda laŭdo) kaj Erwin Storms, du junaj kaj promesplenaj novaj membroj. Poste s-ro Van Eynde montris tri filmojn el kiuj unu estis tute en Esperanto. Unu filmo pritemis la ekeston de la elektro, du aliaj turisman temon, nome Anglujon kaj la lignokulturadon en Svedujo.

La 23an de Majo estis "Pentekosta atmosfero". Dank'al la bona ideo de tri fraulinaj, Agnes Geelen, Carine kaj Lydia de Muynck, la salono estis ornamita per multaj floretoj. En tiu ĉi

## GRUPA VIVADO

kadro oni pritraktis la lingvoproblemon : Agnes Geelen legis artikolon el "Esperanto" de D-ro. Henrik Måler pri lia kondukiĝo al la internacia lingvo, kaj S-ro Paesmans laŭlegis altvaloran kaj parte menkompilitan tekston pri la rilato inter Esperanto kaj unuflanke hindeŭropaj, aliflanke orientaj lingvoj.

La 30an D-ro Wim de Smet paroladis pri "La Vivo en la Erikejo", en la kadro de Esperanto-Komitato Intergrupa, tio kie preparo por la promonado tra la erikejo kiu okazis la postan dimanĉon. Eĉ venis geamikoj el Nederlando kaj el Bruselo por aŭdi la interesajn klarigojn pri ĉiaj plantetoj kaj birdoj kiuj tie vivas.

"La historio de la Esperanta Disko" estis la titolo de la vespero kiun prizorgis nia sonorilaristo Jo Haazen. Li rakontis vere ĉion pri la historio de la esperanta disko de antaŭ la milito ĝis hodiaŭ. Sed ne simple rakontis, li ankaŭ audigis diversajn partojn, nome francan, nederlandan kaj antverpan "esperojn", parton el elparolkurso de profesoro Edmond Privat, popolkantojn, modernajn kaj klasikajn kantojn en nia lingvo, ktp. Multaj miris ke jam ekzistas tiom da diversaj ekzempleroj en nia diskaro.

El Mehleno venis Ivo Durwael por rakonti "Travivaĵojn de Instruisto". Ni aŭdis plej strangajn anekdotojn de obstinaj infanoj ĝis kleptomaniuloj same kiel interesajn sonbendaŭdigojn kaj psikologiajn faktojn pri la infano kaj ties mondo.

Fakte ne organizita de "La Verda Stelo", sed tamen de du Verdstelanoj, estis la vesperkoncerto kun la virhorso Foerster el Brno, Ĉeĥoslovakio. Efektive, laŭ iniciato de Jo Haazen kaj Eugene Paesmans, 250 personoj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kunvenis en salono de la urbo por aŭskulti la majstre kantitajn ĉeĥajn muzikverkojn. La direktanto, prof. Karel Hradil anoncis ĉiujn erojn en Esperanto kaj Jo Haazen aldonis klarigojn en la nederlanda kaj esperanta lingvoj. Multaj gazetoj sendis raportiston al la

koncerto kaj dank'al tio ĉiu povis vidi ke esperanto estas vivanta internacia lingvo.

La 20an de Junio S-ro E. Paesmans gvidis nin denove tra malnovaj partoj de nia urbo, tra partoj pri kies ekzisto ni preskaŭ ne sciis. La agrabla vetero kaj la sciindaj klarigoj de la gvidanto, kune kun la sonorilarmuziko kiun Jo Haazen tiumomente spruĉis super la urbon, ĉio tio estis la elementoj de la tioma sukcesplena vespero de nia grupo.

Same sukcesplena estis la vespero de la 27a dum kiu S-ro Van Eynde inter aliaj prezentis du originale esperantajn filmojn. Ili estis senditaj al ni pere de la Norvega Esperanto-ligo kaj la ambasadejo de Norvegujo en nia lando. Same la enhavo, la elparolo kaj la aspekto estis altnivelaj kaj donis favoran impreson pri la norvega ĉefurbo Oslo. Vere, la neĉeestantoj unu fojon pli malpravis!

La 4an de Julio komencis por ni la feria tempo, kun malpli da ĉeestantoj ofte, sed ne kun malpli bonaj programoj. Unuavice pruvis tion Sus Schellekens kiu vojaĝigis nin tra Germanujo kun interesa, ofte sprita komentario. La diapozitivaj estis kiel ĉiam ĉiuj perletoj, eĉ pli belaj ol en realeco!

La 11an Jo Haazen paroladis pri orgenoj ĝenerale kaj pri la orgenkoncertoj kiuj estis okazontaj en Antverpeno kaj la postan vendredon ni vizitis unu el tiuj koncertoj. La aŭskultintaro unanime aprobis tiun ĉi novan iniciaton. "Agrabla kunesto" estis ne nur la titolo de la sekvanta kunveno, sed vera priskribo de tiu vespero ĉar fine ni denove trovis inter tiom da programoj iom da tempo por simple agrable babilo kaj klaĉi.

La unuan tagon de Aŭgusto 25 esperantistoj kunvenis por kvizi. Du grupoj batalis unu kontraŭ la alia ĝis la lasta spiro, por la honoro kaj... por granda skatolo da kuketoj... La demandoj temis pri turismo ĝenerale, sed ankaŭ pri apudkuŝaj fakoj, kiel popolmuziko kaj popoldancoj, geografio kaj eĉ trinkaĵoj el diversaj landoj.

Pro laboroj en la salono ne plu estis kunvenoj ĝis la 29-a.

#### FAMILIA VIVO :

Nia honora-prezidanto kaj honora ĝenerala prezidanto de BEF, s-ro Maurice Jaumotte, iĝis oficiro en la Ordo de la Krono. Nome de la tuta grupo,

la prezidanto kaj la komitato kore gratulas!

Gratulon ankaŭ al niaj membroj Edi Frederickx kiu edziĝis kun Niki Dumon kaj al s-ro P. Smets pro la naskiĝo de lia nepino kaj baptofilino Linda, jam membrineto de nia klubo!

#### REGA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

Kunsidoj: Ĉiulunde je la 20-horo en nia kunveno Hotel "EXCELSIOR", 7, rue du Progrès, Bruselo.

La 6an de januaro S-ino Elly Staes organizis Epifanian Feston. Pluraj membroj rakontis pri la folkloraj legendoj en diversaj landoj. Estis sukcesplena vespero kun bongustaj kukoj kaj kafo en humorplena sfero.

La 13an S-ro Lernout parolis pri Strasburgo. La prelego estis ilustrita per tre belkoloraj diapozitivaj kaj la preleganto rikoltis multe da sukceso.

La 20an okazis nia Ĝenerala Jarkunsido. Post raporto de la sekretariino F-ino Bauwens, kaj de la raporto de la kasistino, S-ino Jacobs, ambau raportoj estis plene aprobataj, okazis malsarĝo de la sep elirintaj gekomitataĵoj. Post diversaj formalajoj la gembroj elektis jenan komitaton: Prezidanto: S-ro R. Jacobs. Vic-prezidanto: S-ro G.C. Fighiera. Kasistino: S-ino R. Jacobs. Sekretariino: S-ino E. Ernst. Helpsekretariino: F-ino S. Opsomer. Propagandistino: F-ino M.F. Bauwens. Redaktoro: S-ro H. Castel. Dankante por la fido flanke de la membroj, la nova komitato kunsidis por la labordivido.

La 27-an S-ro Van der Stempel gvidis la perfektigan kurson kun kutima kompeteco kaj afableco.

La 3an de Februaro: Parolata ĵurnalo. S-ro Castel (serio "A") akiris la plej altajn poentojn por: "Campiono de la UNO tradukistoj - Franco legas 53 lingvojn" kaj S-ino Ernst (serio "B") por: "Nutraĵo el la maro".

La 10an S-ro Jacobs enkondukis debatvesperon kiu devis anstataŭi la perfektigan kurson de S-ro Van der Stempel kiu pro malsano neĉeestis. Speciale priaktata estis la libreto de D-ro P. Denoël: "L'Esperanto dans l'Enseignement".

La 17an S-ino Fighiera enkondukis kaj gvidis la vesperon dediĉitan al la Internacia amika semajno. La ĉeestantoj plenigis la programon per rakontoj pri sperta amikeco dank al Espe-

Por ĉiuj viaj asekuoroj - reasekuoroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvb.a.

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

TRANSPRENO	127.079 F
S-ro Vital Montélet (Grivegnée)	20 F
Koran Dankon !	127.099 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraĵoj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
Telefona 272875



ranto. Kaj ni sendis salutkartojn al multaj gesamideanoj en la mondo. Estis varia, ege interesa kaj sukcesplena kunveno.

La 24-an S-ro Jirousek parolis pri sia vojaĝo al "Israel" kaj montris belajn diapozitivajn kiuj gvidis nin al mirinda lando en plena kresko. Tiel ni vizitis multajn urbojn, kibutson, kaj konatiĝis kun la vivo en la sankta lando. La multnombra ĉeestantaro malavare aplaudis S-ron Jirousek kiu sukcesis vekti intereson por tiu malproksima lando.

La 3-an de marto okazis denove "parolata ĵurnalo". S-ro Van der Stempel (serio "A") akiris la plej altajn poentojn por "Eksplozema XXa jarcento" kaj S-ino Ernst (serio "B") por: "La ideala sekretariino". Sed speciala kontribuo al la parolata ĵurnalo estis la temo elektita de S-ino Staes kiu koncernis la inauguron de la Reĝa Biblioteko Albert la.

La 10-an estis anoncita la prelego de S-ino Bernaerts, Antverpeno, pri "Ghandi kaj la vero". Sed lastmomente devis okazi progamŝanĝo ĉar la prelegintino malsaniĝis. S-ino Fighiera bonvolis plenigi la vesperon per audiĝo de diskoj el diversaj landoj en la kadro de la internacia amika semajno kaj per legado de kelkaj paĝoj de la Fundamenta Principaro de Frostvalen kiu estos la bazo de estonta diskutvespero.

La 17-an S-ro Vijncke audigis al ni sonbendon parolatan de S-ro Petro Polišćuk, prezidanto de Usbeka Asocio de Amikeco, kaj li ankaŭ montris kelkajn diapozitivajn de tiu malproksima lando.

La 24-an okazis nia mitulvespermanĝo en bonhumora amika rondo ĉe bona glaso da vino. Kaj la vespero tiel agrable komenciĝinta daŭris ĝis malfrue en la nokto.

La 31-an S-ro Van der Stempel enkondukis kaj gvidis debatvesperon sub la temo: "Eksplozema XXa jarcento". Ekestis tre interesa kaj vigla debato.

La 14-an nia grupo multnombro ĉeestis la kunsidon ĉe la SAT-Amikaro, kie prelegis kun lumbildo S-ro Fighiera pri "La masakro de Montségur au la Krucmilito kontraŭ la Katharistoj".

La 21-an S-ro Van der Stempel gvidis la perfektigan kurson.

La 28-an S-ro R. Van Humbecck gvidis debatvesperon koncerne "La prin-

ciparo de Frostavallen" kaj kaptis ĉies atenton aŭdigante al ni per sonbendo la komenton de S-ro Lapenna pri la preparo de gazetara konferenco, dirita en Würzburg la 29-an de decembro 1967 okaze de internacia seminario de junularo, kiu ankaŭ tuŝis la temon elektita de la preleganto.

La 5-an de majo: Parolata ĵurnalo. S-ro Castel (serio "A") akiris la plej altajn poentojn por: La virinoj, plej malfeliĉaj en la mondo". Pro tempomanko ne okazis la legado de la artikoloj de la serio "B".

La 12-an de majo S-ro Lernout aŭdigis al ni per sonbendo prelegon pri BIZANCO - KONSTANTINOPLO - ISTANBULO fare de li mem. La temo estis pritraktita laŭ historia, religia, politika, geografia kaj kultura vidpunkto.

La 26-an de majo S-ro Van der Stempel gvidis la perfektigan kurson.

La 2-an de junio S-ino L. Bernaerts el Antverpeno, sed membrino de nia grupo, parolis pri "Ghandi kaj la vero". Ŝi pritraktis lian vivon de la naskiĝo ĝis la tragika morto de tiu granda homo, kiu dediĉis sian tutan vivon al la batalo kontraŭ la perforto, predikante la neperforton kaj paciencon. La ĉeestantoj dankis kaj gratulis ŝin por ŝia profunda kono tiucele.

La 9-an de junio S-ino Opsomer prelegis pri Meksiko. Post la prelego ŝi rondirigis diversajn librojn kiuj ilustris sian tre zorge preparitan prelegon.

La 16-an de junio la parolo estis denove al S-ro Van der Stempel kiu en la kadro de la perfektiga kurso parolis kaj klarigis detale la diversajn gramatikajn malfacilaĵojn de nia lingvo.

La 23-an de junio ni havis la grandan plezuron auskulti S-iron Staes, kiu prelegis pri "Pieter Breughel - de Oude" laŭ Gustav Glück. S-ino Staes dividis la prelegon en 3 partoj: la unua parto pritraktis la tekston, science kaj

LES ENTREPRISES

**DERKS**

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92

Entrepreno de  
KONSTRUAĴOJ



Ensendojn por la

vintra

numero ni petas

antaŭ la 10.11.1969

(aperdato en

decembro)

bonege preparitan, la dua parto estis pristudo de unu pentraĵo kaj la tria parto la projektitaj bildoj. S-ino Staes kaptis ĉies atenton per tiu altnivela neordinara prelego.

La 30-an de junio S-ro Castel enkondukis debatvesperon pri la sorto de la japaninoj, la plej malfeliĉaj virinoj en la mondo. Ekestis vigla debato al kiu ĉiuj partoprenis kaj tiamaniere S-ro Castel atingis la celon, paroligi kiel eble plej multe da ĝeĉeestantoj.

La 7-an de julio devus okazi: parolata ĵurnalo, sed kaŭze de la jam plena libertempa periodo ĝi estis ansta-

taŭta per libervola kontribuo de S-ino Ernst, kiu rakontis pri sia vojaĝo al la fjordoj de Norvegujo. Estis ne preparita kaj ne atendita vojaĝraporto pri la lando de Peer Gynt.

La 14-an de julio S-ro Lernout audigis al ni denove - je la demando de la grupanoj - la prelegon per sonbendo pri BIZANCO - KONSTANTINOPLO - ISTANBULO. S-ro Lernout montris kvanton da koloraj lumbildoj kaj rakontis samtempe pri multaj tre interesaj detaloj koncerne la evoluon de tiu tre malnova urbo.

Sinjorino Sprengers-Vranken el Mehleno, operaciita al la kokso la 5.2. en la Akademia malsanulejo de Gent, tre kore dankas la bonajn gentajn gesamideanojn por iliaj plurfoje ŝatataj amikaj vizitoj dum sia restado en la lito.

#### Korespondanconco

29 jara fraŭlino, komencantino en esperanto, volas interŝanĝi poŝtmarkojn bildkartojn kaj antikvajn monerojn, kaj korespondi.

Matysiak Jeny ; Biale-Bloko 2 ; p.a. Grabowno ; pow. Olesnica Śl ; woj. Wrocław Polando.

#### LA INTERNACIA CIRKULERO :

Tre interesa eldono de Paul Peeraerts, Drakenhoflaan 97 Deurne-Antwerpen pri internacia korespondado kaj kolektado. Se vi volas ĝin ricevi dum la tuta jaro, skribu al la menciita adreso kaj aldonu unu respondkuponon.

## LIEĜO

Kiel dirite en "Sonorilo" N-ro 2: la grupokunvenoj okazos regule ek de oktobro en "Prince de Liege".

Inter la kunvenoj la plej interesaj dum la ses unuaj monatoj de la jaro (julio kaj aŭgusto: libertempo:) ni citu senorde:

"Vojaĝo tra Francujo (kun diapozitivaj). komentis S-ro Kuster.

"Mia regiono., (kun diapozitivaj), komentis Ges-oj Dujardin.

"Pilgrimado tra Francujo (kun diapozitivaj). komentis S-ro Kuster.

Retrospektivo de la internaciaj kongresoj de UEA, fare de D-ro Denoël (kun filmoj). "Vivo de Gandhi laŭ E. Privat" de Jean Pirard. Ĉiuj prezentadoj estis sekvitaj de viglaj diskutoj. Pluraj grupanoj partoprenis la 49an belgan kongreson en Bruĝo kaj la Trilandan Renkontiĝon en Valkenburg. Fine de septembro ni organizos "Rally-on" por geesperantistoj en Waterloo, okaze de la "Jaro Napoleono". Tiu loko estas facile atingebla de aŭtomobilistoj de tuta Belgujo. Pri la rezulto vi legos en la venonta "Sonorilo".

## BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA - REĜA SOCIETO

Kunveno: marde je la 20-a horo, en "Strijdershuis"  
Hallestraat, 14. (apud Markt).

Adreso de la prezidanto: Ch. Poupeye, Filips de Goedelaan, 17-B.  
Tel. (050) 183.58

La 13an de majo okazis en la prezidantejo projekciado de kolordia pozitivaj pri Bruĝo kun reproduktado de sonorilar-muziko.

La 15an kelkaj gemembroj partoprenis en grupa vojaĝo al Liège, Visé, Maastricht kaj Lichtaart, organizita de la "Komitato por forlasitaj Infanoj".

Dimanĉon 18-an grupa delegacio ĉeestis la Esp. tagon organizita de la Nord-Francaj esperantistoj en la Komerca Foiro de Lille. Pri tio estis raportata dum la kunveno de la 20a en "Strijdershuis".

La 3an de junio libertempaj aranĝoj estis preparolataj. La 8an kelkaj grupanoj vizitis la kastelon kaj parkon de Beloeil. La 17an kaj la 24an okazis la dulastaj kunvenoj antaŭ la libertempo, sed la 26an multaj grupanoj partoprenis gvidatan viziton al la fama ekspozicio pri la "Sennomaj Primitivoj".

La 12an de aŭgusto multaj grupanoj vizitis vespere la preĝejon de Sta. Anna en Bruĝo, kie okazis tre interesa "Lumo kaj Sono" prezentado pri la multaj artaĵoj en tiu preĝejo.

La 16an pluraj samideanoj, inter kiuj F-ino. Verbeke el Lille, renkontiĝis ĉe la rimarkindaj "Kanalaj Festoj" de Bruĝo.

La 17-an kelkaj muzikamantoj ĝuis belegan aŭdigon de la "Vespro della Beata Virgine" de Monteverdi en la preĝejo de Sta Walburga en Bruĝo.

La 9an de septembro okazis plia kunveno en "Strijdershuis", kiu ĉefe okupiĝis pri administraj aferoj. La sekvantan tagon kelkaj grupanoj vizitis la reĝan palacon kaj la ekspozicion Brueghel en Bruselo kaj poste la provincan bienon en Huizingen. Pri tio estis raportata dum la ordinara kunveno de la 16-a. La 30an la grupanoj estis invitataj ĉe la prezidanto, kie F-ino. Y. Poupeye projekciis belajn kolordia pozitivajn: unue pri la Belga kaj Markola Kongreso en Bruĝo kaj due pri libertempado en suna Rapollo kaj ĉirkaŭaĵoj (Italujo).

## FAMILIA KRONIKO

La 31an de julio naskiĝis MARTINE, filineto de Ges-roj. J. VAN PARYS el Wingene. Ŝia patrino Christine Van Parys kaj ŝia baptopatrina F-ino. Yolande Van Parys estas membrinoj de la Bruĝa G.E.. Korajn gratulojn al la tuta esperantista familio.

## ESPERANTISTA SKIFERIO - ADELBODEN SVISLANDO

26 decembro 1969 - 4 januaro 1970

ADELBODEN estas skiparadizo en Bernaj Alpoj, alta je 1400 m kaj permesanta skii ĝis 2500 m.

Por la dektria fojo ni organizas skiferion, ĉar la pasintaj ĉiam bone sukcesis. Jen kelkaj informoj:

LOĜEJO: simpla bela ĉaledo en la koro de fama skistacio. Ĉiuj helpas por la domo laboro: kuirado, purigado... Tranoktado en dormejoj kiel en junulara gastejo. Ekzistas nek duŝejo, nek banejo.

AĜO: de la 16-a jaro, kaj ĝis oni ne plu sentas sin sportema.

PROGRAMO: skiado: ekskursoj; vesperoj kun prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj...

PREZO: por la tuta restado svisaj frankoj 150.- por loĝado, hejtado, manĝoj. Asekuro kontraŭ ski-akcidentoj estas deviga kaj kostas svisajn frankojn 27.- por la tuta restado. La jam asekuritoj devos pruvi, ke en ilia asekuro la ski-risikoj estas asekuritaj. Ne enalkulitaj: veturkostoj, skikursoj, trinkaĵoj dum la piknikaj manĝoj.

AVERTO: krokodilado ne estos tolerata.

VOJAĜO: de la fervoja stacidomo **Frutigen** per aŭtobuso ĝis la haltejo **Schützenbrücke** (unu haltejo antaŭ Adelboden mem). El tie vi trovos indikilojn kun la nomo ESPERANTO.

ADRESOJ: por la aliĝo kaj korespondado: Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, **CH-2314-LA SAGNE**.

Dum la skirestado: Esperanto, Egghaus, Boden, **CH-3715 ADELBODEN**.

ALIĜO: aliĝu plej rapide per poŝtkarto. Menciui viajn nomon, antaŭnomon, sekson, adreson, naskiĝdaton, profesion, alventagon kaj forirtagon kaj eventuale rimarkojn (ĉu vi akceptus prelegi, alportos diapozitivajn, deziras ricevi informojn...)

SKRIBU PRESLITERE. Antaŭpago samtempe frankojn 50.- al la poŝtkonto **23-2921** laŭ la ĉi supra adreso. Aliĝo nur validas post ricevo de la antaŭpago. Nia ĉaledo ne estas elasta, do tuj aliĝu se vi deziras esti inter la 23 partoprenantoj.

PLIAJ INFORMOJ: fine de novembro ni sendos al la aliĝantoj cirkuleran leteron pri la detala programo, luprezoj de skioj, veturilprezoj...

La organizantoj: Claude kaj Andrée Gacond

La 55a universala kongreso okazos en Vieno (Aŭstria) (la ĝis 8a de aŭgusto)

Ne ekzistas dubo ke tiu kongreso, en la centro de la kontinento, kaj en tiel bela lando, havos tre grandan sukceson. La ŝtata prezidanto estos ĝia alta protektanto, estante mem esperantisto.

La provizora programo havas, krom la kutimaj manifestacioj, ankaŭ manifestacion antaŭ la kongreso, kaj postkongresajn aranĝojn. Detaloj ankoraŭ ne estas konitaj.

## KONGRES-KOTIZOJ - U.K. VIENO

Ĝis 31.12.69 gld.

- 1) Kongresano ne membro individua de UEA 75,—
- 2) Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ) 62,50
- 3) Kongresana individua membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA) 50,—

- 4) Edz(in)o de Kongresano en kategorio (1) 52,50
- 5) Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3) 44,—
- 6) Junulo ĝis 20-jara 22,50
- 7) Universitata studento ĝis 30-jara 37,50
- 8) Blindulo 30,—

# manuŝakturajo ŝirmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056)216.54



## **VIRINAJ BLUZOJ** **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko

por la eleganta sinjorino

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej

altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj  
konfekcibutikoj

### **PRECIPAJ CENTROJ :**

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	:	12 Marché-aux-Légumes
Brugge	:	Breidelstr. 8
Brussel	:	Anspachlaan 194 Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	:	Brabantdam 21
Herstal	:	4 Rue Large Voie
Leuven	:	Bondgenotenlaan 13
La Louvière	:	16 rue Albert 1er
Luxembourg	:	67 Place de la Gare
Mechelen	:	IJzeren Leen 32
Oostende	:	Kapelstraat 23
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	75 Rue Royale
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	2 Pont St. Laurent
Wetteren	:	Jos Buyssestr. 39-a